

revuo

esperanto

majo 1967

60-a jaro

n-ro 738 (5)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



JULIO BAGHY 1891-1967

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 73 Julio Baghy (nekrologo)
- 74 La poeto kaj la homo (V.S.)
- 75 Ĉambro Stefano La-Colla;
Komuniko de la Akademio de Esperanto
- 76 Direkti la agadon eksteren (Estraro);
Prelegoj de la prezidanto de UEA en Moskvo
kaj Leningrad
- 77 Antikva Palestino (mapo)
- 78 Recenzoj
- 79 Ricevitaj eldonaĵoj;
Nekrologoj Pados, Erdey, Alberich, Smith
- 80 Mallonge
- 81 52-a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967;
Memoriga kalendaro;
Esperanto en radio
- 82 La Juna Vivo
- 83 Oficiala informilo n-ro 401;
La internaciaj konkursoj 1967
- 84 Anoncetoj

kovrila bildo

Julio Baghy deklamas el siaj verkoj: foto
farita okaze de lia 75-jara datreveno, 1966

bildojn liveris

- 74 (supre) Pölöskey
- 75 JUNFILM Pölöskey
- 80 Espéranto Actualités

oficiala organo
de universala
esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

JULIO BAGHY

Jam tra la tuta mondo diskuris la funebra sciigo pri la forpaso de Julio Baghy la 18-an de marto 1967.* La konscio, ke la poeto jam de multaj jaroj luktis kontraŭ malsano, povis iom mildigi la ŝokon, sed ne la perdon, ĉar Julio Baghy neniam kapitulacis al malsano kaj ankoraŭ ĝis la plej lasta tempo pelis sin al ĉiaspeca aktiveco. Nur tri semajnojn antaŭ la morto aperis lia lasta libro, "Ĉielarko". Kiel Honora Kongresano li sentigis ĉie sian ĉeeston pasintjare en Budapeŝto, sed pruviĝis jam lia tiea profetaĵo: "Tre verŝajne la lastan fojon mi staras antaŭ vi". Ne plu li nin salutas.

La 25-an de marto oni enterigis lin en la tombejo Farkasrét en Budapeŝto. Preskaŭ mil personoj forlasis siajn laborejojn por adiaŭi lin. Komitatano I. Bácskai, nome de UEA faris funebran paroladon kaj metis florkronon. Nome de Hungara Esperanto-Asocio parolis d-ro J. Máteffy, vic-prezidanto. Pri la funebra ceremonio detale raportis la hungaraj gazetaroj, radio kaj televido.

Julio Baghy naskiĝis en Szeged, Hungarujo, la 13-an de januaro, 1891. Sekvante la profesion de siaj teatraj gepatroj li studis du jarojn (1908-10) en aktora lernejo. La gestoj kaj elokvento de aktoro restis ĉe li tutvive. Dudekjara li ekkonis Esperanton: "en 1911 mi vidis lernolibron en butikoj, legis ĝin, kaptiĝis ne de la lingvo, sed de la ideo, kaj fervore lernis". Sekvis jaroj de profesia aktorado en diversaj teatroj.

La milito interrompis en 1915 lian karieron, sed ne lian agadon: jam samjare, militkaptito en Siberio, li komencis en siaj tiel draste ŝanĝitaj cirkonstancoj gvidi Esperanto-kursojn, aranĝi teatrajn vesperojn, redakti bultenetojn, verki poezion.

Fordonis sin al Esperanto

Reveninte en 1921 la hejmlandon li fondis en Budapeŝto unikan kulturan klubon Esperanto-Rondo Amika, kaj ĝi eldonis lian unuan poemaron, litografitan broŝuron "Bukedo". En 1922 sekvis ankoraŭ pli grava fando: tiu de "Literatura Mondo", kun Kalocsay kaj Teodoro Schwartz. En tiu tempo Baghy jam fordonis sin preskaŭ tute al Esperanto. Komenciĝis periodo, en kiu li prelegis kaj instruis (laŭ la Cseh-metodo) en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo. Inter 1923 kaj 1936 li aktoris kaj reĝisoris en ses Universalaj Kongresoj.

Lia poemaro "Preter la vivo" (1923), en kiun eniris ankaŭ la fruaj poemoj de "Bukedo", markas lian rekoniĝon en monda skalo. La saman jaron li fariĝis membro de la Lingva Komitato. Sekvis la romano "Viktimoj" en 1925 kaj nova poemaro "Pilgrimo" en 1926, kiam ĉesis aperi "Literatura Mondo". Eble tiu malapero (pro nesufiĉa publika apogo) igis lin

proponi en 1927, ke la naskiĝa datreveno de Zamenhof estu samtempe "Tago de la Esperanta Libro".

La popularecon de Baghy plu altigis la eldono de la unua grava novelaro en Esperanto, "Dancu, marionetoj" (1927). En 1928 aperis lia unua lernolibro por hungaroj, kaj en la postaj kvin jaroj li donis sep novajn verkojn: "Migranta plumo" (1929), "Hura" (romano, 1930), "Printempo en la aŭtuno" (romaneto, 1931), "La vagabondo kantas" (poemoj), "Verdaj donkiĥotoj" (parte romano) kaj "Sur sanga tero" (romano), ĉiuj en 1933, kaj "La teatra korbo" (prozaĵoj, 1934), por jam ne paroli pri lia "Publika letero pri la reorganizado" (1931).

En 1929 li eniris la Akademion de la tiama Lingva Komitato. En la dua periodo de "Literatura Mondo" (1931-1938) li estis komence ĉefredaktoro sed rezignis tiun oficon pro la disputoj pri neologismoj en 1933. La disputojn tamen jam priridis "Arĝenta duopo" (1937). La sama jaro vidis la unuan eldonon de "La verda koro". Sekvis novaj rekonoj: ekde 1937 Honora Membro de IEL (poste UEA), en 1938 vic-prezidanto de la Akademio (ĝis 1951), en 1939 komitatano de UEA (ĝis 1949).

La milito eksplodis, sed la esceptaj kondiĉoj en Hungarujo permesis daŭrigi ioman agadon, kaj Baghy estis literatura redaktoro de "Hungara Heroldo" kaj vic-prezidanto de Hungara Esperanto-Federacio. En 1943 li devis militservi. Pereis la manuskripto de nova romano "Insulo de l' espero", same (1942) la unua eldono de "Koloroj".

La postmilita tempo komenciĝis bonaŭgure per nova lernolibro por hungaroj (1946), dua eldono de "La verda koro" (1947) kaj la reapero de "Literatura Mondo" kun Baghy kiel ĉefkunlaboranto. Sed post du jaroj denove ĉesis "Literatura Mondo", kaj la postan jardekon nigrigis la silentigo de la hungara movado kaj la malsaniĝado de Baghy mem.

En 1956 li fine povis denove saluti Universalan Kongreson kiel prezidanto de la nova Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro. En 1958 Stafeto eldonis lian "Sonĝe sub pomarbo", "lirika komedio, kiun mi surpaperigis por rifuĝi el la anim- kaj nerv-muela angoro dum la morna historia tempo en vintro de 1956-1957". De 1959 ĝis la morto li denove oficis kiel komitatano de UEA. Fine aperis "Koloroj" (novelaro, 1960) kaj tria eldono de "La verda koro" (1962). En Hungarujo mem aperis la nova jubilea libro "Ora Duopo" (1966) — en 4500 ekzempleroj. El liaj lernolibroj, kiuj kune atingis 40 000 ekz., la lasta jam havis ses eldonojn. Li restis ĝis 1965 prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (antaŭe HEK), kaj ĝis la morto membro de la Internacia Ekzamena Komisiono.

Funebras lin edzino, gefiloj kaj familio, ĉiuj, kiuj konis lin, kaj ĉiuj, kies lingvon li riĉigis per siaj verkoj.

* Ni pardonpetas pro la dat-eraro en la aprila "Esperanto" (p. 57).



Julio Baghy kun Alfonz Pechán (ĉ. 1962)

LA POETO KAJ LA HOMO

La sorto volis, ke samjare naskiĝis, samjare lernis Esperanton kaj samjare debutis kiel originalaj poetoj du samlandanoj, kiuj en perspektivo elstaras kiel la ĉefaj figuroj de la Esperanta literaturo: Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay. Aliaj nomoj ludis rolon antaŭ ili, sed, kiel skribis foje Auld, "sur la ŝultroj de la du hungaraj kolosoj... konstruiĝis nia vere matura poezio". Kiu ajn prijuĝo de unu devas aludi al la alia.

William Auld (por resti ĉe tiu fonto) nomis ilin "tute memstaraj genioj, kiuj ambaŭ havis ion valoregan por doni al la juna literaturo"... "Kiel Kalocsay respondis al la lingvaj bezonoj de la movado en tiu epoko, tiel Baghy respondis al ĝiaj ideologiaj bezonoj". Kiel Kalocsay dediĉis sin unuavice al tradukado, tiel Baghy prefere verkis originale. Kiel Kalocsay strebis al vastigo de la lingvaj rimedoj, precipe de la vortaro, tiel Baghy esploris la esprimblecojn de la ekzistanta lingvaĵo. Kaj, iom ironie, dum Kalocsay pli konscie klopodis influi la evoluon de la lingvo, la pli grandan influon al la ĝenerala lingvo-uzo verŝajne atingis, per sia populareco, ne Kalocsay sed Baghy.

Klara stilo, humana enhavo

La popularecon de Baghy kondiĉis ĉefe du faktoroj: la simpla, klara, konservativa stilo de liaj verkoj kaj ilia humaneca, funde optimisma enhavo.

Dum Baghy neniam atingis la poetikan kaj teknike-lingvan brilecon de Kalocsay, lia stilo estis ĝenerale pli nature flua, kaj lia evitado de neologismoj gajnis por li la simpatian de la ĝenerala legantaro. Eble lia ekspresa verkado (La pli-ol-400-paĝa "Hura", ekzemple, en nuraj 34 tagoj) kulpis, ke en la fruaj verkoj aperas kelkaj hungarismoj; en aliaj kazoj la esperantologoj devos decidi, ĉu tiun aŭ alian nezamenhofan uzon la publiko lernis de li; aŭ ĉu li nur sekvis jam firmiĝintajn lingvajn kutimojn de la plimulto.

La esencan enhavon de lia verkaro kiel pli trafe esprimi ol per lia propra devizo: Amo kreas pacon, Paco konservas homecon, Homeco estas plej alta idealismo? Se ne per la versoj de Kalocsay:

*Julio Baghy, homo homa.
Homecon serĉas malespere
Kaj luktas arde kaj kolere
Kun la Milito sango-voma.*

La esprimo "Homo homa", kiun unue uzis Baghy mem en pluraj verkoj, estas nur ŝajne pleonasma. Klarigas ĝin liaj rimarkoj al Sturmer, kiu lin demandis pri la siberiaj kruelaĵoj: "Mi vidis homojn krucumitaj... jes, vi pravas, are la homoj emas besteci, kiuj individue estas homecaj. Tiaj estas ni ĉiuj, ankaŭ mi mem". La malbono, do, devenas de la socia situacio. En 1941 li deklaris antaŭ la Hungara Esperanto-Kongreso: "En ĉiu milito oni povas gajni batalojn, sed vere venki nur tiu povas, kiu per kompreno kaj amo kreas la pacon kaj redonas al la homa animo tiun liberecon, kiu havas solan celon sur la tero: harmonie vivi homan vivon sen detruo de tiuj valoroj, kiujn sanktaj konsideras ĉiu popolo en sia historio".

Poeto aŭ prozisto?

Julio Baghy: poeto, romanisto, novelisto, dramverkisto — kiel la estonteco rigardos lin? Kiuj konis lin, verŝajne juĝos sub influo de lia poeta personeco kaj teatraj gestoj. Certe lia pozicio en nia poezio estas tiu de epokfara konstruanto, kaj lia profesia-devena kontribuo al nia malabunda teatra repertuaro havas unikan valoron. Pri lia prozo, aliflanke, jen la juĝo

La 40-jara Baghy (fumanta) kun Jean Forge ĉe la Universala Kongreso en Kraków, 1931.



de Drago Kralj: "La valoron de lia prozo ni ne rajtas trotaksi, kaj same ne fari malon; li fakte estas la plej bona kaj la sola 'granda' prozverkisto de la periodo inter la du militoj". Iuj pecojn oni povas opinii tro palaj aŭ tro sentimentalaj; aliflanke Auld metas "Sur sanga tero" inter la kvar plej bonaj romanoj originale verkita en Esperanto. Estas signife ankaŭ, ke pluraj el liaj prozaj verkoj ĝuis sukceson en nacilingvaj tradukoj.

Natureco kaj fluideco

Lian pioniran rolon en la originala poezio Waringhien resumis jene: "La unuan fojon oni aŭdis lirikon de melodio, bildriĉa, ardatona in-spiro, kiu plektis la Esperantajn vortojn al sia kantado sen ia ĝeno, kun la sama natureco kaj fluideco, kiel la vortoj de malnova nacia lingvo; tio estis ia revelacio de la poezieco de Esperanto". Kiel esprimis mem la titolo "Preter la vivo", la juna Baghy estis poeto romantika, kiu verkis,

*por ke vi ridu kaj larmu sincere
sonĝojn naivajn de mondvagabond'.*

Sed samtempe li estis poeto de suferoj: "Neniam lia liro pli bele sonas ol kiam li kantas melankolie la ĝemon de l' homoj malfeliĉaj, de l' soldatoj fratemaj devigataj al buĉado, de l' patrinoj korŝirataj pri la edzo for en milito" (Privat). Hodiaŭ oni povus aldoni, ke neniam li atingas pli potence emociajn efektojn, ol en la grizaj postmilitaj jaroj, kiam li grimace plendis:

*Sparas la viv' pri ŝanco kaj ŝanĝo...
Montro de lang' do estu respondo,
kiam mi mute pendos sur branĉo:
aĉa kaj fia estas la mondo...
Kiel fiigis aĉe ci, mondo!*

Oni nepre ne nomu lin simpla romantikulo. Ankaŭ kiam temis pri Esperanto mem li montris sin klarvida, realisma. "Kara mia", li diris al Sturmer en 1929 (kaj kiu ne reaŭdas je tiuj vortoj lian akcentoriĉan voĉon?) — "kredu min, nun, kiam la 'interna ideo' en nia movado malplifortiĝas, niaj verkistoj kaj nia literaturo estas plej necesaj. Estas la literaturo, kiu gardas la spiriton de nia lingvo, kiu tenas ĝin viva".

Ke ni posedas tian literaturon, ni en granda mezuro dankas al Julio Baghy. V.S.



ĈAMBRO STEFANO LA COLLA

Ankoraŭ unu ĉambro en la Domo de UEA en Rotterdam ricevis dediĉan nomon pro la donaco de 5000,— gld. S-ino Averina Sforza La-Colla, vidvino de prof. Stefano La-Colla, dediĉis ĉambron al la memoro de sia edzo, donacante la diritan sumon al UEA.

Prof. La-Colla estis honora membro de UEA, akademiano kaj la eldonanto de la 3-a eldono de Plena Gramatiko. Li forpasis la 5-an de februaro 1966 (vidu la nekrologon en "Esperanto", aprilo 1966, p. 73). Li estis delegito de UEA, en Palermo, Romo kaj Milano, ekde la fondiĝo de la Asocio en 1908 ĝis la morto. Inter liaj prilingvaj verkoj elstaras ampleksa vortaro itala-Esperanta, ankoraŭ ne eldonita.

UEA esprimas al s-ino La-Colla sian altan ŝaton pro la grandanima gesto, per kiu ŝi donis konkretan formon al la memoro pri la forpasinto.

LA DEKTAGA POSTKONGRESA EKSURSO DE UEA TRA ISRAELO

montros al vi komforte kaj trankvile ĉiujn vidindaĵojn! Vidu detalojn en la Dua Bulteno. Anoncu vin antaŭ la 20-a de majo.

Komuniko de la

AKADEMIO DE ESPERANTO Sekcio de la Ĝenerala Vortaro

La Akademio aprobis la ideon de starigo de "Baza Radikaro Oficiala", kies celo estas aparte proponi la vulgaran aŭ lernolibran vortprovizon, tiel ke laŭeble "la vortaro de la lernolibroj fariĝu tute unueca, kaj ĉiu povu certe scii, kian vortkonon oni povas supozi ĉe iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro".

Tiu baza Radikaro Oficiala estos ellaborita en la venontaj monatoj surbaze de projekto, kiu entenas proksimume 2500 radikojn kaj elementojn, dividitajn en naŭ grupoj de ofteco: de la unua grupo de plej oftaj elementoj ĝis la naŭa kun relative malpli oftaj radikoj kaj elementoj.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,
D-ro A. Albault
La Prezidanto de la Akademio,
G. Waringhien

oficialaĵoj

esperanto
majo 1967

La regula Estrara Kunsido okazis en la Domo de UEA de la 1-a ĝis la 3-a de aprilo, kun ĉeesto de prof. Lapenna, s-roj Carlén, Becker, Jaumotte, Toczyski kaj Woessink, la direktorino, KKS kaj redaktoro de "Esperanto". Kiel ĉiujare, la Estraro fiksas la definitivan tekston de la Estrara Raporto pri la agado de UEA kaj de CED en la pasinta laborjaro 1966-7 kaj krome pritraktis longan kaj varian tagordon.

Tutunue la Estraro esprimis sian profundan malĝojon pro la forpaso de Julio Baghy, kiu havis senfinajn meritojn en la Esperanto-movado, kaj sian kondolencon al liaj familianoj.

Informado kaj financoj

La plej grava decido de la kunveno estis certe tiu, kiu koncernis la intensigon de la ekstera informa agado de la Asocio. Konkrete, ekde 1968 CED komencos eldoni kvarmonatan sciencon revuon pri la monda lingva problemo, kun artikoloj en naciaj lingvoj kaj resumoj en Esperanto — kondiĉe ke troviĝos la necesa kapitalo. Ĝi traktos diversajn aspektojn de la lingva problemo kaj celos unuavice al universitataj kaj similaj medioj. Detaloj aperos post nelonge.

Pri la Propono al Unuiĝintaj Nacioj, prezentita jam la pasintan oktobron, la Estraro decidis esprimi al la Sekretariato de UN fortan bedaŭron, ke ĝi donis ĝis nun nenian sekvon al tiel grava afero, kaj prezenti la demandon al la Universala Kongreso en Tel Aviv. La sintenon de la Sekretariato ĝi ne povas alie kompreni, ol kiel intencan prisilentadon de la afero.

La Estraro diskutis la financajn rezultojn de 1966 kaj akceptis buĝetproponon por 1968. La jaro 1966 denove finiĝis per deficino. Kvankam la nombro de novaj membroj ne sufiĉis por egaligi la spezojn, alvenis ĝojige multaj donacoj, kaj tial la deficino ne estis tiel granda, kiel oni povis antaŭtimi. Kvankam en 1967 ne okazos konkurso kiel tiu de 1966, la Estraro petas ĉiujn daŭre klopodi por varbi pliajn individuajn membrojn. Kun granda ĝojo ĝi notis, ke en 1967 la Asocio jam ricevis po 5000,— gld. por du ĉambroj en la Domo de UEA. Ĝi aparte dankas ankaŭ al ĉiuj, kiuj malavare kontribuis al la Fondaĵo Por Vastigo de la Agado okaze de la Propono.

Kongresoj kaj eldonaĵoj

La Estraro fiksas la definitivan programon de la Universala Kongreso en Tel Aviv, kiu sendube estos unu el la plej interesaj. Por Madrid (1968) ĉio aŭguras tre favore. En Madrid okazos la 4-a Internacia Arta Festivalo. La kotizo restos la sama, kaj individuaj membroj de UEA ĝuos, kiel jam por Tel Aviv, grandan rabaton. La datoj estos: 3-10 aŭgusto 1968.

Jen koncize la ceteraj decidoj pri eldonaĵoj: Dum 1967 la revuo "Esperanto" havos 8 paĝojn pli, ol buĝetite, pro donaco de la presisto, s-ro W. Zwagers, al kiu la Estraro esprimas grandan dankon pro lia gesto. De la Jarlibro 1967 la Dua Parto aperos, kiel en 1966, antaŭ la Kongreso. La Praktiko suferis iom da prokrasto pro transloĝigo de la redaktoro, sed nun jam reakuratiĝas. Aliaj malfacilaĵoj malfruigis la revuon Kontakto, sed la membroj kaj abonantoj por 1967 nepre ricevos ankoraŭ ĉiujn kvar numerojn.

PRELEGOJ DE LA PREZIDANTO DE UEA EN MOSKVO KAJ LENINGRAD

La prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, pasigis en marto kvar semajnojn en Soveta Unio por faka studo. Li utiligis la restadon en Moskvo kaj Leningrad ankaŭ por kontaktoj kun la reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj. Krome prof. Lapenna faris tri prelegojn. La 15-an de marto li prelegis en kunveno de la Esperanto-societo en la Domo de Medicinistoj en Moskvo. Ĉeestis ĉ. 120 personoj. Vigla diskuto sekvis, kaj la prezidanto havis la okazon respondi al multaj demandoj rilate la lingvan situacion kaj la rolon de UEA. Poste estis komuna vespermanĝo en la restoracio "Praga", dum kiu prezentigis konvena okazo por interŝanĝi pensojn pri plia fortikiĝo de la Esperanto-Movado en Soveta Unio.

La 16-an de marto la prezidanto prelegis en la Moskva Ŝtata Universitato por gestudentoj pri "La Lingva Situacio en la Nuntempa

Mondo". Ĉeestis ĉ. 150 personoj. Tiu ĉi prelego okazis en la Internacia Lingvo kun sinsekva tradukado en la rusan fare de fraŭlino Vera Zlotnikova. Amaso da demandoj post la prelego. Multnombra aliĝo al kurso por komentantoj.


La 23-an de marto prof. Lapenna prelegis en la Esperanto-Societo de Leningrad. La aranĝo okazis en la Muzika Salono de la Domo de Kulturo laŭ la nomo de Kirov. Ĉeestis ĉ. 100 personoj.

La prelegoj kaj la personaj kontaktoj, kiujn havis la prezidanto kun la gvidantoj de la Esperanto-Movado en Soveta Unio kaj kun la multnombraj membroj de la du Esperanto-Societoj, sendube helpas al plua disvastiĝo de la Internacia Lingvo en Soveta Unio kaj al pli bona kompreno de la signifo de UEA por antaŭenigo de Esperanto per modernaj metodoj en la nuntempa mondo.

ANTIKVA PALESTINO

Laŭ konsiloj kaj klarigoj de d-ro Donald Broadribb

Senornamaj liter-tipoj indikas nun-epokajn urbojn.



Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, de Ivo Lapenna. Eld. la aŭtoro, Rotterdam, 1966. 152 p. 21 x 15 cm., plaste bind. 11,— gld., 44 st.*

La paroladoj kaj prelegoj de Ivo Lapenna altrudiĝas kiel peco el la historio postmilita de la Esperanto-movado, tiel signifoplenaj ili estas. Ankaŭ literaturan valoron ni povas asigni al ili — ne vane ni serĉas ateston pri la esprimforto atingebla en lingvo tro ofte aludita kiel "artefarita". Fine ili prezentas ekzemplojn de retoriko, studkampoj, kiu antaŭe estis neglektita inter ni, sed kiu ja estas grava precipe en kulturmovado, kiu tiel dependas de la viva vorto. Jen studmaterialo por "niaj estontaj Demostenoj", kiel skribas profesoro Waringhien en tre sprita kaj klera antaŭparolo.

Sobreco sen sekeco

Ĉiu aŭtoro havas sian stilon. Tiun de Lapenna oni kredeble povus rekoni el teksto anonima. — "Mi turnos min pli al la cerbo ol al la koro, pli al la racio ol al la sentimentoj", li diras, eĉ se li rekonas, ke en la festa horo de Universala Kongreso, "en tia tute speciala etoso de entuziasmo ĝenerala kaj feliĉo komuna certe ne maltaŭgas ideoj tre altaj, esprimataj per vortoj elektitaj, sonoraj, poeziaj." Sed, eĉ se Lapenna estas sobra, ne mankas bilda esprimo, lia sobreco ne estas sekeco. Pri la Esperanto-literaturo, "tre diverskolora kaj belegaj mozaikoj de la spiritaĵoj valoroj de ĉiuj popoloj", li precizigas, ke "ĉiu nova traduko, ĉiu nova originala verko ... signifas plian internan riĉiĝon de la lingvo kaj plian cementigon de ĝia kohereco". Kaj preskaŭ en formo de maksimumo li priskribas gravan antitezon de la vivo dirante "Ĝis nun ni penadis nur per la forto de la argumento, sed kontraŭ ni staris la argumento de la forto", kaj patose, en la fino de kongresa festparolado, li instigas, ne sen alvoko ĉi tie al la sentimentoj, ke "ni fiere flirtigu larĝe kaj alte, tre alte super la mondo, tiun nian verdan standardon de la espero, la solan ne makulitan de homa sangoo..." — ja sonoraj konataj el la tradicioj de la pionira epoko.

Akra kiel razilo

Kiel polemikisto Lapenna estas akra kiel razilo, kaj li ofte esprimas sin bruske al la kontraŭulo. Bolas en li la indigno, kiam li en Montevideo la 4-an de decembro 1954 devis interveni per mallonga (laŭtrude triminuta) paroladeto defenda pri Esperanto, kiu estis atakita de profesoro Blinkenberg en la Programkomisiono de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, kaj poste kiam li faras aldonan paroladeton, kiu poste renversis la tutan situacion je favoro de Esperanto, enkondukante sian intervenon per la jenaj vortoj: "Sinjoro Pre-

zidanto! Jam tri fojojn mi levis la manon, sed vi aŭ ne vidas aŭ ne volas vidi min. Mi insiste petas la parolon por fari gravan deklaron" (pri la Peticio). Tiu lia drameca deklaro ampleksas nurajn 11 presitajn liniojn — sed ili ebligis la aktivecon, kiu fine kondukis al la fama Rezolucio de Unesko.

La plimulto de la paroladoj estas tiel nomataj festparoladoj faritaj por la inaŭguro de la Universalaj Kongresoj — ili fariĝis tradiciaj, kiel antaŭe estis la brilaj festparoladoj de Edmond Privat en la intermilita periodo. Ambaŭ estante eminentaj oratoroj, ili multe diferencas. La paroladoj de Privat agordas la etoson de la pioniroj, la batalantoj de la "interna ideo", ofte en poeziaj parolturnoj: "ekstere la mondo ankoraŭ noktas, malfermu la pordon, ke ili vidu la lumon!" li finas la festparoladon de la Universala Kongreso en Danzig, se mi bone memoras. Lapenna en siaj paroladoj intelektuale analizas esencajn aspektojn de la lingva problemoj kaj de la movado, ĉiam volante kontribui al la filozofio de la pledantoj por la Internacia Lingvo. Li diskutas ideologiajn elementojn de esperantismo, la internaciecon de Esperanto, la kontraston de lingvoprojekto kontraŭ fakta lingvo, humanisman internacismon en rilato al Internacia Lingvo, la vivantecon de Esperanto, ĝian literaturan rolon, la faktojn de lingva diskriminacio kaj diversajn aliajn problemojn ligitajn al la ĉiam ŝanĝiganta situacio de Esperanto en rilato al la same ĉiam ŝanĝigantaj cirkonstancoj politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj en la mondo ekstera al la movado.

Konvinka inform-artikolo

Kiel duan parton la libro enhavas tri prelegojn, el kiuj mi trovas aparte interesa la unuan, La lingva problemoj en la internaciaj rilatoj. Tiu ĉi studaĵo estas tiel dokumentoplena, donanta la historian fonon por la disvolvigo de la problemoj, ke ĝi tre nete kondukas al tiuj konkludoj, por kiuj ni pledas. Ĝi estas unu el la plej konvinkaj informaj artikoloj pri Esperanto, kiujn iam ajn mi legis.

Oni ne bezonas rekomendi libron verkitan de Lapenna. Sed mi ripetas, ke ĝia signifo estas plurflanka, nome historia, literatura kaj didaktika, donante, el vidpunkto de retoriko, modelajn tekstojn. Ĝi donas legafon inspiran kaj instruon, kiun ne malpleje devus studi la juna generacio, tiu de la pluportantoj de niaj tradicioj kaj aspiroj.

Paul Neergaard (Kopenhago)

Ĉiujn eldonaĵojn signitajn per steleto oni mendu ĉe UEA, la aliajn ĉe la koncerna eldonejo.

MODERNA ĈEĤA ROMANO

Romeo, Julieta kaj la tenebro, romano de Jan Otčenášek. El la ĉeĥa: Vladimír Váňa. Eld. Stafeto, La Laguna, 1965-7. Beletraj kajeroj n-ro 26. 175 p. 18 x 12 cm.* 6,50 gld.

En la profunda nokto de la nazia okupado en Ĉeĥoslovakio la popolo povis nur esperi: esperi, ke iam la lumo revenos, kaj ke la invadintoj fine devos forfuĝi. Ĉiutage la loĝantoj de Prago povis legi sur murafiŝoj longajn listojn de ekzekutitaj patriotoj kontraŭ-germanaj, por ke en ili tiel malaperu ĉia ribelemo. Sed la plej obskura sorto trafis la judojn.

Ĉi tiu romano, la dua (kaj pli matura) de Otčenášek, hodiaŭa ĉeĥa verkisto, priskribas la vivon de juna pragano, Paŭlo, kiu kaŝas en ĉambreto apud la vendejo de sia patro judan knabinon el kampara regiono, Ester, kiu, pro sia raso, estus devinta iri al la koncentrejo de Terezín. Inter ili ekfloras senespera amo, kiun nutras kunaj fantaziaĵoj kaj projekto pri la estonteco. Sed ĝin kontraŭas la germanaj leĝoj ("Rassenschande"), la malfacila vivo: Paŭlo devas ŝteli dehejme iom de la jam malabunda manĝo por nutri la kaŝigintinon, kaj tie kaj tie la nazi-kompliko ĉirkaŭspionas.

Ester tamen ne povas rezisti al la mortiga enuo de senfinaj tagoj: iom post iom ŝi fremdiĝas al si mem; malespero kaj tragedia sento pri la absurdeco de ŝia situacio ŝin kaptas. Komence ŝi klopodas venki tiun senton per la rememoro al la ĉiuvesperaj renkontiĝoj kun Paŭlo kaj per etaj, senbruaĵ ordiglaboroj. Sed fine, dum la traserĉoj de la germana polico okaze de la atencmortigo de Heydrich, ŝi, kvazaŭ trance, instinkte, decidas forlasi sian sekuran kaŝejon por fuĝi al la libero, kiu tamen, por ŝi, juda, signifas ankaŭ morton, kaj tiel, per unusola absurda ago, definitive forlasi absurdan situacion. Ankaŭ ŝi sekvos do la destinton de sia popolo, kontraŭ kiu, dum momento, ŝi provis ribeli.

Ĉirkaŭ la du ĉeffiguroj rolas aliaj personoj, ne tre detale karakterizitaj, kiuj pleje reliefigas la centrajn rolantojn. Iliaj karakteroj, kvankam skizaj, ĉiam montras humanan, eksterne eble feblan flankon, kiu, kiam necese, scias ankaŭ havi forton.

La traduko de ĉi tiu belaspekta libro estas tre flua, vigla, vortriĉa. La malsamaj parolmanieroj kaj ĵargonoj estas tre trafe karakterizitaj per taŭgaj frazformoj, vortkunmetaĵoj, neologismoj. La frazo estas ĝenerale kurta, nerveza, esenca.

La antaŭparolo de Louis Aragon enkondukas la leganton en la problemon de la pozicio de Otčenášek en la ĉeĥa literaturo kaj de la rilatoj inter la moderna ĉeĥa literaturo vivo kaj la okcidentaj literaturoj.

Tazio Carlevaro (Svisujo)

LA AVIADILA KARAVANO DE UEA

al Tel Aviv tutcerte okazos sendepende de la nombro de partoprenantoj. Oni povos forveturi en diversaj urboj de Eŭropo. Anoncu vin antaŭ la 20-a de majo!

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Analizo de la klasoj en la ĉina socio, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 17 p. 15 x 10 cm. 0,25 gld.*

Parolado en la tutlanda konferenco de la KPC pri propaganda laboro, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 27 p. 15 x 10 cm.*

Decido de la Centra Komitato de KPC koncerne al la granda proleta kultura revolucio. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 18 p. 15 x 9 cm. 0,25 gld.*

Jaroj sur tero, memoroj de Lakshmiwar Sinha. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1966. 126 p. 19 x 12 cm., bind. 11,50; br. 8,50 gld.*

Ham's Interpreter, de DJ Ø OY kaj DL 1 CU. Eld. DL 1 CU, Stuttgart, 1966. 5-a eld. 52 p. 21 x 15 cm. Radioamatora frazaro 10-lingva (ink. Esperanton). 5,70 gld.*

Kroatoserba-Esperanta vortaro, de Marinko Gjivoje. Eld. Znanje, Zagreb, 1966. 369 p. 17 x 12 cm. 14,50 gld.*

Anuário Esperantista 1967. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro. 108 p. 19 x 14 cm. Jarlibro portugallingva.

Manuale della lingua Internazionale Esperanto, de G. Pacelli. 2-a eld. Giardini, Pisa, 1966. 333 p. 21 x 15 cm. 10,— gld.* Lernolibro por italoj.

El mia esperantista vivo, de M. Blicher. Eld. Kehlet, Helsingør, 1967. 16 p. 21 x 13 cm., ilustr.

Rendszeres eszperantó nyelvtan (Sistema Esperanta gramatiko), de Kalocsay kálmán. Eld. Tankönyvkiadó, Budapest, 1966. 243 p., 20 x 14 cm. Bind. Hungarlingva. 10 000 ekz.

Fiat 124. Eld. FIAT, Torino, Italujo, 1966. 8 p. 20 x 21 cm. Senpaga kolora prospekto.

Arabaj diraĵoj, atribuataj al imamo Ali. Tr. kaj eld. Hussain M. Al-Amily, Daftardar Bldg., 8th FL. (Apt.5), Banks' Street, Baghdad, Irako. 10 p. 34 x 22 cm., hektog.

NEKROLOGOJ

IMRE PADOS

Imre Pados, delegito en Budafok, Hungarujo, dum ĉ. 30 jaroj, mortis 69-jara je 13 feb 67.

FERENC ERDEY

Mortis en Budapest d-ro Ferenc Erdey, kunprez. de la antaŭmilita Hungara Esperanto-Federacio, profesoro de Teologia Akademio, iama FD.

SEBASTIÀ ALBERICH-JOFRÉ (1897-1967)

En februaro, 69-jara, mortis en Barcelona s-ro Sebastià Alberich-Jofré, iama prezidanto de Kataluna Esperanto-Federacio, kunlaborinto de Kataluna Antologio, ano de la Lingva Komitato kaj malnova membro de UEA.

EDGAR J. SMITH

La 17-an de marto 1967 mortis s-ro E. J. Smith, 70-jara. Li estis tre malnova membro de UEA kaj instruis en la grupo de Brighton, Britujo, dum pli ol 20 jaroj.

recenzoj
ricevitaj eldonaĵoj
nekrologoj

esperanto
majo 1967

LAŬLANDE

Francujo

• La populara kantisto Enrico Macias baldaŭ registros kelkajn el siaj plej sukcesintaj kantoj ankaŭ en Esperanto. Tion li konfirmis en intervjuo por "Espéranto Actualités", la informa bulteno de Unuiĝo Franca por Esperanto, aperanta nuntempe en 6 500 ekz. (foto)

Hindujo

• Inter multaj vizitantoj al nova ekspozicio de Bengala Esperanto-Instituto en Sriniketan (6-8 feb 67) estis s-ro U. N. Dhebar, iama prezidanto de la partio Hinda Nacia Kongreso kaj eksĉefministro de unu el la hindaj ŝtatoj.

Italujo

• Lernantoj el Gambio, Gano, Kipro, Nigerio, Irano, Pakistano kaj Somalujo sekvas kurson en Torino post prelegoj en la Profesia Centro de Internacia Labor-Organizaĵo (ILO).

Japanujo

• Ĵus komenciĝis oficiala, libervola Esperanto-kurso en la Universitato Soŭa, Tokio. Ĝi okazas ekster la normalaj lekciaj horoj, sed kun salajrata lektoro (s-ro Akira Morita).

Kanado

• S-ro C. V. Narasimhan, vic-sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kiu en oktobro 1966 akceptis la delegacion de UEA, vizitis je la 17-a de

Enrico Macias (Vidu: Francujo)



esperanto
majo 1967

marto konferencon de ĉ. mil elementlernejaj instruistoj en Ottawa. S-ro L. OhUiginn, prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio, faris por li bonvenigan paroladon en Esperanto.

Soveta Unio

• La prezidanto kaj sekretario de la Komisiono de Sovetaj Esperantistoj lastatempe vizitis Bulgarujon por konatiĝi kun organizaĵaj metodoj de la bulgara movado.

Svisujo

• En junio la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds inaŭguros apartan ĉambron por la libraro kaj dokumentaro de Edmond Privat. S-ro Claude Gacond trastudas kaj klasigas la Esperantajn materialojn.

Usono

• Instigite de la itala enketo (februaro, p. 19), s-ino Pat Shell, studentino en Kalifornio, preparis similan enketon por mezlernejoj en San Mateo. Unu interesa rezulto: el 238 respondintoj, 66% jam aŭdis pri Esperanto; nur 5% iam aŭdis pri alia projekto de planita lingvo.

LAŬFAKE

Geologio

• D-ro J. Kavka (Lužná 7, Praha 6 - Vokovice, Ĉeĥoslovakujo) organizas petskribon al la 23-a Internacia Geologia Kongreso, okazonta en Prago en 1968, ke ĝi akceptu Esperanton kiel unu el siaj oficialaj lingvoj. Personoj, kiuj povas kolekti subskribojn de geologoj aŭ parencaĵoj en sia lando, bv. kontakti d-ron Kavka.

Kemio

• La sola naturscienca revuo en la Internacia Lingvo, "Kemio internacia", jam finis sian duan eldonjaron. La artikoloj de la jarkolekto 1966 rilatas interalie al tendencoj en analiza kemio, dolĉigo de sala akvo, antibiotikoj, enzimoj, vulkanaj rokoj kaj kolorimetrio: entute do al plej diversaj kampoj de la kemio. Jarabonon (5,40 gld.; 21,6 st.) peras UEA.

Literaturo

• Post "Reĝo Lear", prof. Kalocsay jam finis tradukojn de du aliaj dramoj de Shakespeare: "Somermeznokta sonĝo" kaj "La tempesto". Ambaŭ estas duafoje esperantigitaj.

Radio-amatoroj

• Por ebligi regulajn konversaciojn inter la plimultiĝantaj radioamatoroj-esperantistoj, je interkonsentitaj tagoj, horoj kaj frekvencoj, OE 3 RU Rudolf Bartosch, A-3812 Gr. Siegharts, Aŭstrujo, petas urĝan helpon por fondo de Internacia Ligo Esperantista de Radio-Amatoroj (ILERA).

Sociologio

• Sub aŭspicio de la Universitato de Hull (Britujo), s-ro Peter G. Forster (Dept. of Sociology, University of Hull) entreprenas sociologiajn esplorojn pri la Esperanto-movado.

**52-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967**

Alta Protektanto: Zalman Sazar, Statprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO N-ro 7

Honora Komitato. Akceptis esti membro de la Honora Komitato Lia Moŝto George Hakim, Grek-Katolika Ĉefepiskopo de Galileo.

Inaŭguro. LKK kaj la Estraro de UEA akceptis la inviton de la Urbeŝtaro de Jerusalemo okazigi la Oficialan Inaŭguron en tiu urbo. Detaloj aperos en la Kongresa Libro.

Diservoj. Evangelia kaj katolika diservoj estas planataj en ligo kun la tuttagaj ekskursoj al Nazareto kaj Jerusalemo, dimanĉon 6 aŭg.

Loĝado. Post la 1-a de majo la Loĝiga Servo de la Kongreso ne plu povas plenumi mendojn. Kiu ne rezervis por si hotelĉambron antaŭ tiu dato, devas tion prizorgi pere de vojaĝ-oficejo en sia lando.

Artaj aranĝoj. En la kongresa programo okazos i.a. teatra prezento de IAT, literatura recitalo de la konata aktoro Nikolaj Rytjkov kaj prezentado de israelaj popolaj dancoj.

Internacia Somera Universitato. Okazos ses prelegoj: de prof. Stojan Djoudjeff, prof. Josef Kohen-Cedek, prof. Kazimierz Kordylewski, prof. Ivo Lapenna, prof. Oton Pancer kaj lektoro J. C. Wells.

Simbola aliĝo. Por personoj, kiuj ne povas entrepreni la vojaĝon al Israelo, sed tamen deziras esti iamaniere ligitaj al la Universala Kongreso, estas starigita speciala "Simbola Aliĝo". Kontraŭ pago de aliĝkotizo de 25,— gld. (100 steloj) la aliĝintoj ricevos specialan kongresan karton kaj la Kongresan Libron.

Statistiko (je 11 apr. 67): Arg. 4, Aŭstral. 6, Aŭstr. 14, Bel. 16, Bra. 2, Bri. 45, Bul. 30, Ĉeĥ. 19, Dan. 26, Fin. 3, Fra. 118, Ger. 20, Gre. 3, His. 13, Hong. 1, Hun. 40, Isr. 116, Ita. 39, Jap. 8, Jug. 31, Kan. 7, Monako 5, Ned. 34, Nor. 8, NovZ. 2, Pol. 103, Portug. 2, Rum. 2, Sov. 4, Sve. 41, Svi. 13, Uso. 27, Ven. 1. Entute 803 el 33 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario



MEMORIGA KALENDARO

Majo

- 6-13 IFEF-Kongreso, Fulda, Germanujo
- 12-15 Franca Kongreso en Calais
- 13-15 Belga Kongreso, Karlarego
- Dana Kongreso, Vejle
- Norvega Kongreso, Sauda
- Sveda Kongreso, Norrköping
- 13-16 Germana Kongreso en Hamburgo
- 25-28 Int. Konf. Naturamiko, Salzburg
- 26-29 Brita Kongreso, Glasgow, Skotlando

Junio

- 2-4 Renkontiĝo-seminario, Plzeň, Ĉeĥosl.
- 22 Limdato por aliĝo al UK Tel Aviv
- 30-2/7 Kanada Kongreso, Trois-Rivières

Julio

- 1 Limdato Foto-Konkurso de UEA
- 1-9 Renkontiĝo en Poděbrady, Ĉeĥoslovakujo
- 2-10/9 Sezono de Grésillon, Baugé, Francujo
- 3-9 Semajno en la naturo, Woumen, Belg.
- 6-9 Usona Kongreso, St. Louis, Missouri
- 7-10 Kultura Festivalo, Opava, Ĉeĥosl.
- 8-15 Somera Universitato, Gyula, Hungarujo
- 16-19 Int. Renkontiĝo, Jihlava, Ĉeĥoslov.
- 17 Turista Festo, Monto Vitoŝa, Bulgarujo
- 22-24 Aŭstra Kongreso, Knittelfeld, Stirio
- 22-29 KELI-Kongreso, Torre Pellice, Italujo
- 23-24 Balkana Renkontiĝo, Bela Palanka, Jug.
- 23-30 Eŭropa Kongreso, Innsbruck, Aŭstrujo
- Int. FERIAJ Kursoj, Helsinge, Danujo
- 23-6/8 Turismaj-Kulturaj Ferioj, Grésillon
- 26 80-jara datreveno, publikigo de Esp.
- 29-5/8 SAT-Kongreso, Malmö, Svedujo
- 29-9/8 Balta Tendaro, Vilnius, Soveta Unio
- 30-7/8 Int. Feriejo-Semajno, Krommenie, Ned.
- 31-12/8 Int. Sem. Blinduloj, Köln, Germanujo

(daŭrigo dekstre)

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan eldonon.

RADIO ROMA. 7-V, Tra la literaturo; 14-V, Novaĵoj el Italujo; 21-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 28-V, Leterkesto; 4-VI, La itala poeto Ludoviko Ariosto; 11-VI, Italaj belartaj urboj: Padovo; 18-VI, La itala arkitekto Vignola; 25-VI, Mezepokaj mozaikoj en la preĝejoj de Romo. La dua parto de ĉiu disendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

POLA RADIO en Gdańsk jam de ses jaroj prezentas ĉiusemajnan programon, kiu konsistas el informoj, komunikoj, poezio, intervjuoj, kaj finiĝas ĉiam per kanzono en Esperanto kantata de profesiaj gekantistoj ofte eĉ famaj. La disaŭdigojn redaktas Jozefo Toczyski. La stacio estas aŭskultebla ne nur en Pollando sed ankaŭ en landoj de okcidenta, norda kaj orienta Eŭropo. Raportoj pri aŭskultado estos ŝatataj; skribu al: Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Pollando.

Aŭgusto

- 2-9 52-a Universala Kongreso, Tel Aviv
- 9-16 23-a TEJO-Kongreso, Natanja, Israelo
- 10-20 Int. Pedagogia Seminario, Szeged, Hung.
- 13-25 Uzbeka Tendaro, Ĥamzaabad, Soveta Unio
- 19-29 Eŭropa Junulara Konf., Enkhuizen, Ned.
- 20-28 Turisma Jun. Kunveno, Bydgoszcz, Pol.

Septembro

- 3-9 Eŭropa Feriejo Semajno, Boldern, Svis.
- 20-3/10 Int. Feriejo, Międzygórze, Polujo
- 30 Int. Renkontiĝo Bystrzyca Kłodzka, Pol.

Oktobro

- 15-21 Int. Aŭtunaj Feriejaj Kursoj, Århus, Dan.
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj



esperanto
majo 1967



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

LA 46-A MESAGO DE LA JUNULARO DE KIMRUJO

Je la tago de bonvolo, 18 majo 1967.

"Jen Kimrujo! Salutojn de geknaboj de Kimrujo al la geknaboj de la mondo je la Tago de Bonvolo."

Tiel komenciĝas la mesaĝo, en la Esperanta teksto, kiun tradicie jam dum 46 jaroj la kimra junularo prezentas al la tutmonda junularo. La bela broŝuro tiutema, havebla de la sekretario de "Goodwill Message", Swyddfa'r Urdd, Aberystwyth, Wales, Britujo, raportas pri pluraj esp'istaj reagoj al la mesaĝo 1966, i.a. el Hungarujo kaj Usono. Ne eblas ĉi tie presi la tutan mesaĝon, sed kiu deziras helpi la disvastigon kaj la komprenigon de la mesaĝo petu ĝian tekston ĉe la supra adreso.

La mesaĝo finiĝas: "Ni do, la estontecaj gvidantoj, kuniĝu por helpi tiujn, al kiuj mankas la bezonoj de la vivo. Ni ankaŭ strebu por forigi militojn kaj disputadojn kaj lukti por nuligi la kaŭzojn de homa suferado. Nur tiel estos feliĉeco en la hejmoj, kaj ĝojo en la koroj de la infanoj tra la tuta mondo."

LA 23-A IJK EN ISRAELO

En la nordo de Natanja, en kvietaj angulo situas la Blua Golfo. La feria vilaĝo kuŝas super la blua Mediteraneo, sed ĝi mem estas verda – inter verdaj kreskaĵoj kaj multkoloraj floroj. Tie loĝas la multaj kongresanoj, kiuj partoprenos la 23-an IJK-on. Tie vi povos ĝui la travivaĵon de reala amikeco inter gejunuloj el diversaj partoj de la mondo.

Se vi volas ĝui la tempon en Israelo antaŭ aŭ post la IJK, vi povas tion fari sen malplenigo de via poŝo. LKK intencas organizi restadon en kibucoj por esperantistoj. Tiel vi laboros matene kaj gustumos la interesan vivmanieron de la kibuco, kaj posttagmeze vi povos ekskursi laŭplaĉe. Se vi interesiĝas: skribu al LKK.

Laŭ la provizora programo okazos tuttaga ekskurso al norda Galileo. La kongresanoj plantos arbojn en Kabri. Poste ili veturos al Roŝ-Hanikra, la plej norda punkto sur la marbordo. Vizitinte kelkajn lokojn ĉe la norda landlimo oni tagmanĝos en arbaro. Oni vizitos ŝipe la restaĵon de la iame vastaj Fulemarĉoj. Se restos tempo, sekvos banado en la lago de Kineret kaj vizito al Nazeret. Tiu ekskurso okazos dank' al la helpo de la Nacia Juda Fonduso.

Jen kiel aliĝi: sendu aliĝilon kaj kotizon al: 23-a IJK, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.

Kotizoj estas:
TEJO-membroj ĝis 20-jaraj: \$ 28

TEJO-membroj pli ol 20-jaraj: \$ 30
Nemembroj de TEJO pagas kromajn \$ 2,-.
Por informoj skribu al: LKK 23-a IJK, p.k. 380, Natanja, Israelo.

La Junulara Sekcio de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato unuafoje invitas al: **INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-SEMINARIO.**

Jen la unua internacia prezentiĝo de la Junulara Sekcio de ĈSEK: en bela broŝuro ĝi invitas al seminario por funkciuloj de la junulara Esperanto-movado, seminario verŝajne enkadriĝonta en la serio de "seminarioj por gvidantoj" de TEJO. La kampadejo Turyn situas en bela, arboriĉa pejzaĝo apud lageto, nur 30 km. for de Praha. Oni loĝos kvarope en lignaj kabanoj kaj bonguste manĝos kvinfoje tage. Dank' al grava helpo kaj subteno de la Distrikta Komitato de la Asocio de Ĉeĥoslovaka Junularo, la seminario estos unu el la plej malmultekostaj E-aranĝoj. Vidu: plena 8-taga restado kaj kompleta programo kostos 280 Kcs (= \$ 17,4).

La datoj estas: 8 ĝis 16 julio. Do rapide anoncu vin al la Junulara Sekcio de ĈSEK, Blanická 4, Praha 2, kie vi ankaŭ petu la broŝuron kun amaso da utilaj informoj. Pagon onine sendu, sed transdonu post alveno.

La programo enhavas prelegojn, diskutojn ktp. pri junularaj problemoj, la Esperanto-movado, kaj Ĉeĥoslovakio. Krome oni abunde amuziĝos surloke kaj per ekskursoj.

KONGRESOJ, KUNVENOJ EN POLLANDO

Post la Internacia Turisma Kunveno oni povos partopreni 10-tagan aŭtobusan **Ekskurson de Amikeco**, de 28 aŭg. ĝis 6 sept. Partopren-kotizo: \$ 59,-.

☆

En julio 1967 okazos en Funka la kvina **BANJO-tendaro**, kie oni instruas fremdajn lingvojn. Por la planata Esperanto-tendaro oni bezonas ĉ. 15 junajn esp-istojn, 12-16 jaraĝajn. La tendara programo estas riĉa, kaj enhavas i.a. aŭtobusekskurson kaj velboatajn ekskursojn. La kotizo egalvaloras ĉ. 40 ned. gld. Pliajn informojn petu de A. Grzebowski, M. Curie-Sklodowskiej 10/1, **Bydgoszcz 9**.

☆

La Turisma Servo de TEJO prilaboros **Eŭropan Turistvojon de Zamenhof**. Ĝi petas sendi al la Turisma Servo de TEJO, A. Grzebowski, M. Curie-Sklodowskiej 10/1, **Bydgoszcz 9**, informojn kaj materialojn pri:

a) urboj, kie estis Zamenhof, kun speciala priskribo de lokoj ligitaj kun E-o;
b) urboj, kie troviĝas monumentoj, memortabuloj k.s., pri Zamenhof aŭ Esperanto.

Oni prilaboros la ricevitan materialon kaj prezentos ĝin al ĝenerala diskuto dum la Internacia Turisma Kunveno en Bydgoszcz.

"NATURBELECO"

estas la titolo de fotokonkurso de la 23-a IJK. La tri plej belaj fotoj ricevos premiojn kaj aperos en la kongreslibro. Fotojn sendu al p.k. 380, Natanja, antaŭ la fino de majo.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstralio

Perth. FD (Turismo): la D.

Brazilo

Santos Dumont (MG) 41 000. D: Carlos Benito Palmieri, juĝoregistristo, Rua Vieira Marques n° 36, Caixa Postal 90; tel. 492.

FD (Geografio brazila), (Historio brazila) & (Religio: rozkrucismo): la D.

Britujo

Arnside (Westmorland) 1 800. D: Leonard Birtwistle, emerito, "Grayrigg", Church Hill.

Ĉeĥoslovakujo

Liptovský Mikuláš (Slovensko) 15 000. D & FD (PTT): Miloslav Rybín, poŝtisto, Štúrova ulica Ĉ. 26/e; tel. 39023.

Vrbno pod Pradědem (Bruntál) 6 000. D: Josef Pařízek, lernejestro; tel. 51.

Francujo

Beziers. FD (Filatelo): la D.

62-Houdain (Pas-de-Calais) 9 000. FD (Turismo): K. Flaczynski, pensiulo, Route d'Haillicourt.

F-85-Les Sables d'olonne (Vendée). D: Roger Claverie, licea prof., Ecole publique, Vairé.

Germanujo

Bad Kissingen. FD (Fotografio), (Sonbendoj) & (Turismo): la D.

Hungarujo

Komló. 32 000. FD (Literaturo): Sándor Polacsek, elektristo, Petöfi u. 41. II. 5.

Italujo

Genova (Liguria) 800 000. FD (Muziko): Gio. Batta Briano, muzikestro, Via Saporiti 8-II; tel. 211.344.

Napoli. D: la FD (Instruado). FD (Laboristaj aferoj): Jakov Perčević, ŝu-specialisto, Via Bologna 51; tel. 515.953 (ĉe Fočić).

Piacenza. 100 000. D: Valentino Guglielmetti, instruisto, Via Felice Frasi 8; tel. 31376.

Rho (Milano) 40 000. D: Nicola Minnaja, ofisto, Via Serra 7; tel. 9301440.

Roma. FD (Geografio): prof. Elio Migliorini, univ. prof., Via Vitelleschi 26; tel. 561389.

Japanujo

Kanazawa (Isikawa-ken) 360 000. D: Syuzi Matuda, komercisto, Nagamati 3-2-9; tel. 0762-61-2629.

Sapporo (Hokkaido) 850 000. FD (Mondfederatismo): F-ino Akiko Nagata, ŝtata oficistino, ĉe s-ino Hidaka, Kita 16, Nisi 5; tel. 71-5863.

Jugoslavio

Ljubljana. FD (Speleologio): Jernej Lindić, kemia teknikisto, Ciril Metodov trg 13; tel. 310-577, fabriko "Lek".

Maribor. FD (Turismo): Milivoje Marašević, trafika ing., Valvazorjeva 8/V; tel. ŽAT 424.

Medulin (Hrvatska-Istra) 900. FD (Turismo): S-ino Nada Kömiveš, muzika pedagogo, Medulin 193, apud Pula.

Zadar. FD (Metio tajloraj): Filip Španjol, tajlorinstruanto, Velebitska 17/4; tel. 2071, 2748.

ADRESKOREKTO JARLIBRO 1967/I

Germanujo. D-8900 Augsburg. VD: Rudolf Kratzmann, Von Willibaldstr. 12 b/I.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Bruce, s-ino L., Christchurch, Nov-Zelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

179 Timmins, s-ro V. J., Aŭstralio. 180 d'Amorim, s-ro Nid Dutra, 181 Farias, s-ro B.F., 182 Gama, s-ro João de Oliveira, 183 Pessoa, s-ro Floriano N. de V., 184 Pinto, s-ro José Dias, 185 Souza, s-ro João Bat. de Melo e, Brazilo. 186 Berry, f-ino E., 187 Clarke, s-ro W., 188 Crabtree, s-ro E. P., 189 Goulding, s-ino Eva, 190 Hardy, s-ino R., 191 Hardy, s-ro S., 192 Hockey, f-ino M. J., 193 Knight, s-ino E. B., 194 Pilling, s-ino F. K., 195 Seddon, s-ino R., 196 Squire, f-ino E., Britujo. 197 Lassen, s-ro Aug., 198 Møller, s-ro Poul, 199 Schleicher, s-ro Ib, Danujo. 200 Beaucaire, s-ro Louis, 201 Bechtold, s-ro L., 202 Epstein, s-ro Felix, 203 Fritsch, d-ro Erdmann, 204 Kraft, s-ro T., 205 Volk, s-ro Friedrich, 206 Wehrheim, d-ro H., 207 Wingen, s-ro W., Germanujo. 208 Bodson, s-ro Claude, Francujo. 209 Ferrer Soler, s-ro Antonio, 210 Perarnau, s-ro Jaime, Hispanujo. 211 Lacalendola, prof. A., 212 Minnaja, s-ro L., Italujo. 213 Lindić, s-ro J., Jugoslavio. 214 Henderson, s-ro Douglas C., Kanado. 215 Hoekma, s-ro A. G., 216 Kalkman, s-ro G., 217 Luyke, s-ro H. C., 218 Wekker, f-ino G., Nederlando. 219 Barrett, s-ro C. R. S., 220 Dewar, s-ro G. D., Nov-Zelando. 221 Andersson, s-ro B., 222 Björnemo, s-ro A., 223 Blid, s-ro A., 224 Emson, s-ino R., 225 Leijder, s-ro

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 31-a de marto 1967

Konkurso I

Lando		kvoto	poentoj	%
1.	Britujo	6691	4814	71,95
2.	(3) Francujo	7752	5278	68,09
3.	(4) Nederlando	5975	3680	61,59
4.	(2) Finnlando	3160	1930	61,08
5.	Usono	4526	2710	59,88
6.	(8) Hispanujo	3250	1945	59,85
7.	Danlando	3099	1655	53,40
8.	(6) Svedujo	7180	3735	52,02
9.	(11) Italujo	4220	2100	49,76
10.	(12) Svislando	2459	1075	43,72
11.	(10) Japanujo	3965	1730	43,63
12.	(9) Brazilo	3856	1571	40,74
13.	Germanujo	7221	2255	31,23
14.	Jugoslavio	5375	1550	28,84
15.	Belgujo	2055	100	4,87

Konkurso II

1.	Kanado	1124	875	77,85
2.	(3) Aŭstrujo	1475	1095	74,24
3.	(2) Islando	250	170	68,—
4.	(6) Aŭstralio	1475	974	66,03
5.	Sudafriko	260	135	51,92
6.	(4) Israelo	595	300	50,42
7.	(11) Nov-Zelando	1481	690	46,59
8.	(9) Madagaskaro	250	102	40,80
9.	(8) Grekujo	270	100	37,04
10.	(7) Norvegujo	1755	610	34,76
11.	(10) Argentino	905	160	17,68

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

oficiala informilo
n-ro 401 1 apr. 1967

esperanto
majo 1967

Hj. Alderin, 226 Lindberg, s-ro E., 227 Mellberg, f-ino G., 228 Olsson, f-ino Agda, 229 Söderberg, s-ro K., 230 Stenberg, s-ro Bengt, 231 Svärd, s-ino Rut, Svedujo. 232 Ammann, s-ro Karl, 233 Jayet, f-ino E., 234 Langmeier, s-ro S., 235 Thum, s-ro J., Svisujo. 236 Calvert, s-ro Eugene, 237 Frezzolini, s-ro D., 238 Sutcliffe, s-ro C. K., Usono.

DONACIOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Nederlando: Blanken, s-ro W., 5,—; Moerbeek, s-ro R., 49,05. Svedujo: Olsson, s-ro Olle, 1,45. Urugvajo: Fernández Menéndez, prof. M., 432,—.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Nederlando: Joon, s-ro C., 4,50.

Sumo entute ricevita: 25 469,67 gld.
Sumo elspezita: 25 851,54 gld.
Saldo negativa: 381,87 gld.

FONDAJO CANUTO

Italujo: Gamberini, s-ro Alfredo: 1 J-MJ.
Soveta Unio: Kubulnieks, s-ro A.: 1 J-MJ.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Martinus-Instituto subtenas liberecon en esplorado kaj kreado de objektiva vivkoncepto. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Se vi volas pasigi viajn feriojn en Nederlando apud la norda maro, skribu al G. Duivis, Kemphaanlaan 3, Heemstede, Nederlando. Tute bonprizorgata, ne profesia, pensiono. Prezoj: plenkreskuloj po F.14 tage, infanoj ĝis la 10a jaro po F.10 tage. En ĉi tiuj prezoj estas enkalkulitaj: tranoktejo, matenmanĝo, lunĉo, vespermanĝo kaj trinkaĵoj. Ne trinkmono. Esperanto parolata.

Ilustritajn revuojn por junuloj eldonitajn dum la jaroj 1932-1940 precipe kun historietoj de Walt Disney serĉas Gustavo Bonvecchiato, via Brizi 5, Milano, Italujo.

S-ano Violin Oljanov, ĵurnalistoj, direktoro de eksterlandkomerca entrepreno, sciigas sian novan adreson: Bulgario, Sofia 8, blok 241/6/75. Oficeja telefono: 73570. Korespondas kun ekstereŭropaj gesamideanoj pri popolmoroj, interesaj kulturaj okazaĵoj.

Princlando Monako. Ni ŝuldas al la esperantemo kaj la laboro de Sinjoro Estro de la urba biblioteko de Monako la organizon, en tiu publika biblioteko, de speciala Esperanto-fako. Ĝi enhavas jam pli ol 120 diversajn librojn. La Estro zorgas ke ili estas en bona loko kaj bindigitaj kiam estas necese. Ĉiuj esperantistoj estas petataj sendi dank- kaj gratul-poŝtkarton al Sinjoro Bibliotekestro, Bibliothèque Communale de Monaco, Rue de la Poste, Principauté de Monaco.

Esperantistoj laborantaj en la sfero de Komunikado — PTT, Radio kaj Televido — povas ricevi senpage la bultenon de la Internacia Poŝtista Esperanto-Asocio (IPEA), se ili sendos sian adreson al: IPEA, Poŝtenska kutija 25, Sofio, Bulgario.

Intersteno — simpla, laŭsona skribsistemo. Esperantistoj petu informon al C. Daglio, Costa Vescovato, Italujo. Aplikita al angla korespondado, petu senpage al A. Regal, 310 Fourth St., Downers Grove, Ill, Usono.

Ekspozicio en lernejo okazos en oktobro. Bv. sendu salutkartojn, esperantaĵojn ktp. al Tomita Gakuen Esperanto-Klubo, Nagamori Noiŝiki, Gifu, Japanujo.

Arnhema Esp.-Klubo organizos letervesperon en la Internacia Korespondsemaĵo. Ĝi petas alsendon de leteroj, bk., k.t.p. antaŭ la 18-a de sept. 1967. Ĉiu sendinto ricevos respondon per bildkarto de Arnhem. Adreso: S-ino C. C. Dorré, Rodenburgstraat 23 III, Arnhem, Nederlando.

Mi deziras Esperantan kajeron/tradukon drameto "Kanto cigna" Ĉeĥov. Detaloj: S-ro McParland, IV, Springfield Park, Belfast, Britujo.

De la disko "La feliĉo" kelkaj ekzempleroj estas teknike neperfektaj. Se vi ricevis tian ekzempleron, vi povas senpage ŝanĝi ĝin ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ nova ekz.

Anoj de Lions International, kiuj estas esperantistoj aŭ interesiĝas pri la Esperantomovado, priskribu vian vidpunkton pri fando de "Esperanto-Grupo de Leonoj" por interŝanĝi ideojn per leteroj aŭ seeble renkontiĝi en Universala Kongreso aŭ Internacia Kunveno de Leonoj. Ni deziras kontakti amikojn—"Leonojn". Skribu al s-ro Nils Gösta Narvala, Majavatie 14 A 7, Helsinki 80, aŭ John Kailenta, 83 Kemball Ave., Staten Island, N.Y. 10314, Usono. Esperantistoj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la Internacio de Leonoj bv. skribi por informoj.

Por sukcesoj kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10 %.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Letervesperoj okazos meze de junio kaj meze de oktobro, por grupeto de 20 gelernantoj (junaj kaj malpli junaj). Sendu, ni petas, amase P.K. kaj leterojn bele afrankitajn. Respondo certigata. Centre Culturel Esperanto, Ecole Renan, Rue de Paris, 76-Sotteville-les-Rouen, Francujo.

ANKAŬ VI ANO DE LA 52-a U.K.!

Multaj esperantistoj, kiuj kutimas sufiĉe regule viziti la Universalajn Kongresojn, esprimis sian bedaŭron pro neebleco partopreni la 52an Universalan Kongreson de Esperanto en Tel Aviv.

Aliflanke ili plene konscias pri la graveco kaj signifo de Universala Kongreso por la unua fojo en Okcidenta Azio, kaj pro tio ili esprimis la deziron iamaniere kontribui al la sukceso de tiu ĉi granda evento.

Por kontentigi tiujn dezirojn kaj doni al ĉiuj esperantistoj — do ANKAŬ AL VI — la eblecon partopreni, almenaŭ spirite, en la 52-a Universala Kongreso de Esperanto, estas starigita, laŭ decido de la Estraro de U.E.A., speciala

SIMBOLA ALIGO AL LA 52-A

Pere de via simbola aligo vi ricevos specialan kongresan karton kaj la Kongresan Libron, kiu donos al vi la eblecon esti informita, malgraŭ la malproksimeco, pri la kongresaj eventoj.

Pere de via simbola aligo vi kontribuos al la kongresaj financoj, kio signifas kontribuon al la sukceso de la unua Universala Kongreso en Okcidenta Azio.

Estu ankaŭ vi ano de la 52-a Universala Kongreso de Esperanto! Simbole aliĝu al la 52-a Universala Kongreso de Esperanto!

Simbola aliĝkotizo estas 25,— gld. (100,— steloj). La kotizo povas esti pagita al la Konstanta Adreso de la Kongreso — Poŝtĉekkonto N. 62 73 37 aŭ Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam — aŭ al la konataj adresoj de ĉefdelegitoj kaj perantoj.

UNIVERSALA SKRIBO de Manuel Halvelik estas duflanka skribmetodo kiu:

a) povas esti uzata kiel prononcon simboliga sistemo pli simpla, racia kaj fleksebla ol iu ajn ĝisnuna figuriga sistemo fonetika -

(Fonimika notado universala)

b) povas esti uzata kiel internacia regularo normigita por reformi la skribmanieron de ĉiu ajn lingvo en la mondo, per delikata kompromiso inter la ofte konfliktantaj postuloj de efektiva prononco, facila legeblo kaj gramatika diferencigo -

(Fonologia ortografado universala)

Tiu ĉi revolucia metodo sekvas la ĝeneralajn liniojn starigitajn de la Internacia Fonetika Asocio sed ĝi ekiras de fundamente malsama bazo, utiligante ordinarajn literojn (ĉefe latinajn) kaj aranĝante ilin laŭ aŭdperceptaj kriterioj anstataŭ parolteknikaj.

30 Steloj - Vendata de UEA - 128 paĝoj

Tekstspecimenoj el multaj lingvoj.

Ĉu d-ro Zamenhof skizis la genian Internacian Lingvon helpe de unesteno?

Ne, ĉar **Universala Esperanta Stenografio** estas tute nova kaj sukcesa aldono al la lingvo Esperanto, por tiel diri skriba suplemento al la Fundamento. La detala lernolibro, 294 paĝoj, formato 16 x 22 cm, aperis en la Jaro de Internacia Kunlaboro, por la 20a datreveno de la starigo de Unesko, sub la aŭspicioj de UEA kaj de EKI.

unesteno kontentigas ĉiujn postulojn: **Korespondskribo** kaj **Rapidskribo**.

El la antaŭparolo de s-ro Erik Carlén, Vicprezidanto de UEA: "Vere, nia lingvo kaj unesteno havas ĝemelajn trajtojn. Mia espero tial estas, ke la esperantistoj en la tuta mondo lernu unestenson."

La lernolibro por instrui sin mem, ankaŭ elstara varbilo por la Internacia Lingvo, estos sendita al vi tuj post ricevo de via antaŭpago de 21 s. fr. (banko kaj poŝtkonto 80 - 799, Schweizerischer Bankverein, CH-8042 Zürich). Ĝi estas ankaŭ havebla de la libroservo de UEA.

Eldonejo Mondo, lernolibra fako, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich 6

unesteno



nepraĵo por ĉiu

NOVA DISKO !

Kantas:

Ramona van Dalsem

akompanas:

TOOS SCHOONMAN

La Feliĉo

kaj ses aliaj kantoj en esperanto

La plimulto de la tekstoj kaj melodioj estas verkitaj de la kantistino mem, kiu jam ricevis bonegan reputacion pro siaj ĉarmegaj, belsonaj kantoj.

Senriproĉa prononco
Klarega lingvo

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo
Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld., 10 steloj
Aldonu 10 % por sendkostoj

Mendu tuj ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964

JAROJ SUR TERO

memoroj de

Lakshmiswar Sinha

Rakonto pri infanjaroj en Hindujo, tiam ankoraŭ preskaŭ netuŝita de eŭropa kulturo, pri junaĝaj jaroj kaj kontakto kun Esperanto en norda Eŭropo kaj fine pri longa vivo en hejmlando iom post iom tute ŝanĝita.

126 p. Riĉe ilustrita. Bind. 11,50 gld; broŝ.
8,50 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.
ELDONA SOCIETO ESPERANTO



JEN VERKO NECESA POR NIA KONFUZA MONDO

DULINGVA LIBRO (HISPANE KAJ
ESPERANTE) HONORE AL U. N. -
ORGANIZO EN LA JARO DE
INTERNACIA KUNLABORO

Enhavo universale valora: Interesega — Instrua — Eduka — Literatura — Agrabla — Poezia kaj tre ilustrita

Unuigintaj Nacioj — Homaj rajtoj — Zamenhof, Paca Apostolo — Esperanto kaj Unesko — Esperanto-kulturo — Esperanto-lernolibro (por Hispanlingvanoj) — Poezia antologio Hispana kaj Hispanamerika — kaj aliaj diversaj temoj tre interesaj

Bindita volumo (cm. 20 × 15) 376 paĝoj, presitaj sur bona papero, kaj ilustrita per 130 fotogravuroj

BONEGA LIBRO POR DONACO

Prezo: U\$S 4.00 afrankite

Mendoj al UEA, al diversaj libroservoj aŭ rekte al "LA BONA SEMISTO"

Casilla de Correo 863

MONTEVIDEO (Urugvajo)